



Letero al la gelegantoj:

Ĉar ne eblis al s-ro Rodney Ring daŭrigi sian laboron kiel redaktoro de la esperantlingva bulteno de ELNA, prezidanto Francis E. Helmuth petis al Erik Felker kaj Charles R. L. Power, ke ili kune transprenu la taskon. De nun ili estras ĉi tiun eldonaĵon. Jen mesaĝo de ĉiu el ili:

de Erik J. Felker--

Ĉu vi havas novaĵon aŭ ideon por diskonigi? Ĉu vi amas poezion? Ĉu vi emas ridi? ludi? kuiri? Ĉu vi interesiĝas pri ka junularo esperantista? Tiajn aferojn pri-traktos mia sekcio de la bulteno.

Sed de kie venos tio, kio informos kaj distros la gelegantoj? De vi! ELNA-Bulteno estu forumo kaj interkomunikilo por tiuj kiuj fidas je Esperanto. Por ke ni atingu tiun celon, mi petas ke vi daŭre kunlaboru kun mi per sendado de novaĵoj, artikoloj, ludoj, sugestoj, ktp. al la redakcia adreso.

Antaŭdankon!

de Charles R. L. Power--

Ne ekzistas pli facila kaj efika rimedo por perfektigi en Esperanto ol legado de nia literaturo, kiu do havas signifplenan rolon jam por komencantoj. Hontinde estas, ke ĝis nun unonanoj-- sendube laŭ rasa konsisto la plej internacia popolo sur la planedo!-- tiom postlamentas pri kontribuo al tiu literaturo. Iam ni almenaŭ disponis pri ne unu sed du bonaj revuoj, Nordamerika Esperanto-Revuo de ELNA kaj Amerika Esperantisto de EANA, sed eĉ ili malaperis. Nun ni havas en Esperanto nur unu bultenon-- sed se venos

sufiĉe da verkoj presindaj, eble tio ŝanĝiĝos! La unuan paŝon al pli kontentiga stato mi provos konduki kiel redaktoro de l' Literatura Sekcio. Ensendu noveletojn, artikolojn, poemojn, kaj recenzojn! Ankaŭ laŭdojn-- kaj insultojn! Gravus via lego kaj reago!

novaĵoj

el Usono

Ekspozicio en la kongresejo

Turismo kaj Esperanto estos la temo de dumkongresa ekspozicio en la kongresejo Hilton. La materialon kontribuos inter aliaj Soveta Unio, Usono, Jugoslavio, Grekujo, kaj F. R. Germanujo.

Porinstruista seminario dum

la 57-a

S-ro Duncan Charters (Usono) konsentis aranĝi kelkhoran porinstruistan seminarion en la kadro de la UK. La seminario estos destinita por personoj, kiuj scias la lingvon kaj intencas instrui ĝin. Broŝuro kun instrukonsiloj kaj praktika "leciono" estos prezentitaj.

Ĉu Esperante...?

Antaŭnelonge la homaro sendis la unuajn intencajn mesaĝojn al la spaco, celante inteligentajn estaĵojn de aliaj planedoj

de la universo. La sciencistoj laboris tre zorgeme por ke la unuaj mesaĝoj estu kiel eble plej kompreneblaj al alispecaj estaĵoj. Por fari tion ili elektis la plej logikajn prezentmanierojn.

Natural History, revuo kiu pritraktas sciencajn kaj antropologiajn aferojn, jam starigis konkurson rilate al interplaneta komunikado. Inter la demandoj kiujn oni faras en la konkurso estas: Kion ni devus diri pri ni? kaj Kiel ni komuniku kun aliplanedanoj? Ĉu ni Esperantistoj ne povas bone respondi al almenaŭ la dua demando? Se vi jes, sendu vian respondon al Natural History, attention: Sky Reporter, Central Park West at 79th Street, New York, NY 10024 (Usono). La redaktoroj de NH ankaŭ akceptos komentojn pri rilataj demandoj (ekz. Kion ni aŭdos unue de alia planedo?) La revuo donos premiojn por la plej bonaj leteroj. Ni skribu, kaj tiel kelkaj aliaj gravuloj scios pli pri Esperanto.



Konkurso pri naturo

Ĉiujare la Ornitologia Rondo Esperantlingva (ORE) aljuĝas sian Premion Simondetti, en valoro de 1,000 BF (usona \$20.00), al elstara artikolo originala aŭ tradukita, pri la tre ĝenerala temo "Naturo".

Ĉiuj partoprenantaj artikoloj aperas konforme al la regularo en "La Mevo", organo de ORE, kaj rajtas pritrakti iun ajn best(ar)on aŭ plant(ar)on. Gekandidatoj por la konkurso 1973 bonvolu peti regularon al la sekretario:

Konkurso Simondetti
p/a Manuel Halvelik
Gebr. Blommestraat 41/0
B-2200 BELGUJO

Ĉina monata gazeto en Esperanto

EL POPOLA ĈINIO

nun varbas abonantojn

Bona ilustrita periodaĵo kun riĉa enhavo por esperantistoj
kiuj volas kompresi la Ĉinan Popolan Respublikon

Kun interesa postkurso legaĵo ĉiunumere por la komencantoj.

Abonantoj, kiuj estas registritaj ĝustatempe, povos senpage ricevi

1973 K A L E N D A R O N e n E s p e r a n t o

Abonu ĉe:

La librovendejo en la kongresejo de la 57-a UK

S-ro William H. Schulze
Esperanto-Inform-Centro
410 Darrell Road
Hillsborough, CA 94010, Usono

La distribuanto: Libroservo de Ĉina Esperanto-Ligo
P. O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio

specimeno kaj varbilo sendata senpage

Glumarko por la Libro-Jaro

Leteroj en Esperanto estas ĉi-jare ornamitaj per nova bela glumarko. Per simpla emblemo kaj klara surpriso ĝi proklamas, ke la jaro 1972 estas la "Internacia Libro-Jaro". Tiel la eldoninto, Universala Esperanto-Asocio, samtempe apogas la tut-jaran kampanjon de Unesko, kiu lanĉis tiun ideon, kaj ankaŭ memorigas, ke estas aparte stimolinda la literaturo en la Internacia Lingvo.

Du interligitaj homfiguroj sur la fono de malfermita libro simbolas la internacian kunlaboron. La celo de la monda kampanjo estas: kreskigi kaj plibonigi la produktadon kaj distribuadon de libroj, precipe en la evoluantaj landoj.

Glumarko de la Internacia Libro-Jaro 1972. Horizontala, 25 x 56 mm., dukolora. En folioj po 16 markoj. Verda kaj nigra preso sur blanka fono. Kun nevidebla gluo kaj stri-truetaro. Vendo-prezo po 0.40 glđ. por ĉiu folio (16 markoj). Aldonu 10% pro la sendkostoj.

Pli da sondbendoj

Kreskas la merkato por Esperantaj sondbendoj. Tion konstatas la Magnetafona Servo de UEA, kiu raportas ke en la pasinta jaro 1971 ĝi vendis 121 programojn.

La Magnetafona Servo disponas nun pri 292 programoj. La uzantoj de la servo povas elekti inter paroladoj de Ivo Lapenna, Edmond Privat, kaj aliaj oratoroj, teatraĵoj kaj kantoj, programoj de la Universalaj Kongresoj ekde Mainz en 1958 ĝis la lasta en Londono-- kaj eĉ la voĉon de d-ro L. L. Zamenhof mem, kopiitan de sur malnova vaksci-

lindra registaro. Listo de ĉiuj disponeblaj bendoj, kune kun la tarifo kaj mendo-kondiĉoj, estas ricevebla ĉe la komisiito s-ro Rüdiger Eichholz, 2040 Springbank Road, Mississauga, Ontario, Kanado

Kubanoj instruas

La kerno de novaj membroj de la Universala Esperanto-Asocio en Kubo vigle aktiviĝis en informado kaj instruado. Apogas ilin senpaga helpo de UEA en la formo de revuoj, vortaroj, ktp. La peranto de UEA en Kubo mem sukcesis laste enpenetri en radioamatorajn rondojn kaj varbis per tiaj elsendoj novajn lernantojn por hispanlingva koresponda kurso loka organizata. Novaj kursoj ekfunkciis inter la laborantoj de la Instituto por Normigo kaj Mezurado kaj de la Akademio de Sciencoj. Inter pluraj lastatempaj radio-elsendoj kaj gazetartikoloj pri Esperanto estis artikolo "Verde Olivo", oficiala organo de la revolucia armeo de Kubo.

Informado ĉe la Olimpiko

Por subteni la agadon de la Germana Esperanto-Asocio inter la sportistoj kaj spektantoj de la venonta Olimpiko en Munkeno, UEA donacas al GEA 20,000 ekzemplerojn de la seslingva faldfolio "La Internacia Lingvo Esperanto". Tiu jam tre konata informilo, kun teksto en la lingvoj angla, araba, franca, germana, hispana, kaj rusa, kaj kun inform-adresoj en 68 landoj, tiel jam atingos eldonkvanton de 100,000 ekzempleroj ĝis nun. La disponigon de tiuj faldfolioj ebligas la Propaganda Konto de UEA, kiu ricevas sian ĉefan enspezon el la Universalaj Kongresoj de Esperanto.

SK
AUG 26
→

Tradukojn tiel facile? Tiel rapide?

Laŭ francaj observantoj, en Sovetunio oni nun uzas laser-radion por fari tradukojn, kaj akiras mirigajn rezultojn. Oni diras ke ĉe la Instituto de Fiziko en Moskvo la radio tramovas paĝon dum malpli ol minuto, tradukante ĝin el la japana, ekzemple, en la rusan.

(informo el Atlas-revuo: Usono)

Junularaj raportoj

Lingvo kaj Kulturo

La "Seminario pri Lingvo kaj Kulturo" okazis en septembro, 1971. Kiom da vi estas legintaj aŭ legantaj la raporton kiun produktis tiu grupo nun malgranda sed en la estonteco eble grava?

La plej interesa ero de la raporto estas fakte aro da diverstemaj raportetoj faritaj de riprezentantoj de diversaj grupoj junularaj. La 16 raportetoj havis kiel ĉeftemoj:

- a. kulturo kaj lingvo el sociologia vidpunkto;
- b. la lingvistika kaj kultura situacio de kelkaj etnaj malplimulto kaj afrikaj landoj;
- c. enkonduketo al politikaj kaj ekonomiaj aspektoj de lingvaj kaj kulturaj fenomenoj kaj inverse;
- d. kultura multlingveco kaj lingva konduto;
- e. la ekzisto de specifa junulara kulturo.

Tiu ĉi raporto estas valora rimedo por tiuj kiuj havas intereson pri la internacia lingvo-problemo, aŭ kiuj devas plani

programojn por Esperanto-klubo aŭ prezentadojn pri Esperanto al la publiko.

Kvankam vi povas mendi la 50-paĝan, broŝuritan raporton en la angla, Esperanto, la franca, la germana, aŭ la nederlanda, mi devas diri ke mi ne mendi ke vi aĉetu ekzempleron por via publika biblioteko; la fizika aspekto de la raporto ne estas sufiĉe bona. Sed nepre aĉetu por vi mem!

Mendu de: TEJO, Binnenkant 46, Amsterdam 1001, Nederlando. Pagigu vian ĉekon (por usona \$1.50) al poŝtĉekkonto "Stichting voor Internationale Kommunikatie", n-ro 1 975 735.

= LASTMOMENTE =

International Pen Friends, organizaĵo pri korespondamikeco internacia, ofertas al la kvin unuaj petantoj inter usonaj Esperantistoj senpagan membrecon en tiu organizo. Ĝia celo estas trovi por la membroj korespondamikojn en aliaj landoj. Normala membrekotizo estas po usonaj \$6.00 jare.

IPF petas iom da persona informo por ebligi trovo de taŭgaj korespondamikoj, kaj vi baldaŭ ricevas liston de korespondemuloj. Dum la jaro oni ricevas aliajn listojn.

Tiu paŝo parte de IPF montras emon kunlabori kun ni. Fakte, en la listo de intereso kiujn oni povas indiki, nun troviĝas Esperanto!

Al usonaj Esperantistoj kiuj partoprenos, oni sendos la nomojn aŭ de aliaj Esperantistoj aŭ de parolantoj de la angla kiuj interesiĝas pri interlingvistiko, ktp.

Kaptu la okazon! Kunlaboru kun IPF! c/o Miss Alice Thornton, 304 South Ardmore # 210, Los Angeles, CA 90020, Usono

LITERATURA SEKCIO

Recenzas William Harmon

Winnie-la-Pu, de A. A. Milne. Elangligis Ivy Kellerman Reed kaj Ralph A. Lewin. Redaktis kaj verkis anglalingvan enkondukon kaj vortaron Humphrey Tonkin. Ilustris Ernest H. Shepard. Eldonis E. P. Dutton kaj Kompanio, Novjorko, 1972. xii+164p. Bind. \$5.95; broŝ. \$3.50.

Kvankam ĉiu lando kaj lingvo havas sian literaturon, tamen ekzistas eroj kiuj preteriras naciecon. Tiaj eroj el la monda literaturo estas plejparte historietoj, fabeloj, poemoj, folkloro kiuj elvokas memorojn de fruaj ĝojoj de eltrovo, aventuro, antcipio de surprizoj, imagado. Tia estas Winnie-la-Pu. Tiaj estas ankaŭ la fabeloj de Grimm kaj Andersen, Alico en Mirlando de Lewis Carroll, Brer Rabbit, Reineke der Fuchs, Djed Moraj el Ruslando, kaj multaj aliaj. La mirado kaj ĝojiga konstanta songado de infaneco perdiĝas tro frue dum la maturiĝo. Ni ĉiuj sentas tion, kaj ofte sopiras al la perdita naiveco kaj freŝa feliĉo de la infanaj jaroj.

Winnie-la-Pu estas urso. Ŝtopita lud-urso el tolo kaj fojno --laŭ la kritika okulo--sed al Kristoforo Robin (knabo), li estas kunulo.

Genie tradukis Reed kaj Lewin la nomojn, spritaĵojn kaj etoson de tiu ĉi rakonto. La azeno Eeyore estiĝas "Ia" kaj en la vortaro oni vidas la verbon "iai" signifantan "bleki kiel azeno". "Piglet" taŭge estiĝas "Porketo". La ĉasita "Heffalump" estiĝas "Hefelanto" kaj la "Woozle", "Vuzlo". (Sendube tre baldaŭ la JEN-anoj kreos novan verbon "vuzli".)

Eble la belklareco kaj legebleco de la traduko ion ŝuldas al la citita helpo de niaj literaturaj gigantoj kiaj Auld, Boulton, Rossetti, Sadler kaj Wells. Sed la finan produktaĵon oni devas taksi altege--vidu speciale la traktadon de la Norda Paliso (Poluso), kaj elstare (ĉe paĝo 88) la "Versoj Verkitaj de Urso de Tre Eta Cerbo".

La poezio en la angla originalo estis tre simpla--kaj ĝuste tia poezio estas samtempe la plej malfacile tradukebla. Komparu la originalon kun la traduko de "Maltrankvila Pu-Kanto" (ĉe paĝo 132):

Hura por Pu!
 (Pu, ĉu?)
 Jes, Pu--
 (Pro kio, nu?)
 Aŭskultu plu....

Laŭ mi, eĉ pli bone en Esperanto!

La libro estis genie planita por esti allogilo por Esperanto, celanta la anglalingvan legantaron. Bonega enkonduko ("malalt-profila") de Tonkin, kune kun klarigo de la korelativoj kaj afiksoj, kaj vortaro Esp-Angla inkluzivanta ĉiun vorton en la libro uzitan konspiras prezenti al la leganto vere ĝuidan ekzemplon de la indeco de Esperanto.

Mi konsilas: Aĉetu kelkajn; donacu al almenaŭ unu biblioteko, almenaŭ unu universitato, kaj prizorgu, ke neniu ŝtelu vian propran ekzempleron!

* - * //!VIVU VERDAPŬK!/* - *

La Respublikoj

--Ricardo Viscarra

Miaj gepatroj ne memoris la fondon de la Unua Respubliko. Ĝi jam ekdisfalas kiam ili estis infanoj, kaj ambaŭ memoris ĝian finon. Panjo estis urbulo, naskita kaj edukita ĉe Jleyerán (la tiama nomo de nia ĉefurbo). Ŝia familio estis "komforta" (oni malĝentile dirus "riĉa"), kaj ŝi pasigis sian infanecon ludante kun du fratinetoj kaj studante siajn lecionojn. Ŝi studentigis en "tre bona" (t. e., konata kaj multekosta) lernejo por "tre bonaj" (t. e., altklasaj) fraŭlinoj. Ŝi povis paroli kaj la francan, kaj la germanan, kaj la anglan (krom tre bele la Volapükon, kompreneble). Amis ŝi poezion, kaj pilkludojn ĝentilajn, kaj katojn. Tiu ĉi sirmita infanino, ĉe tia lernejo edukata, kiel povus koni la gravaĵojn politikajn de la epoko: la militojn eksterlandajn, la disigon de la Asembleo, aŭ la solidigon de la ŝtatpovo inter la manoj de Prezidento Jleyer?

Paĉjo tute malsamis. Kamparano li estis, kaj malkontenta. Ekde la lulilo lia animo sin centris je politiko kaj forto. Oni diris, ke lia unua infana vorto estis "ne", kaj ke li neadis ĉiam poste. Li kredis nenion kaj neniun, kaj suspektis ĉiun. Kompreneble li suspektis ankaŭ Prezidenton Jleyer, samkiel ĉiun alian. Li ne nur "sciis" kion faradas la prezidento; li ankaŭ malamegis la ŝtatestron pro tio. Mia patro estis preskaŭ sen lerneja edukado. Dum lia unua jaro en la kamplernejo oni sendis lin hejmen pro elbuŝigo de kontraŭpatriotismaj vortoj, kaj li neniam reiris al la lernejo. Li parolis malbone kaj hezitege la Volapükon, kaj forte malestimis siajn pli parolpovajn kamaradojn. Por li la perforta uzado de la Volapüka kiel oficiala lingvo de la lando estis maldemokrata samkiel la direktivemo de Jleyer mem, kaj li malkontentis pri ĝi.

Strange estas, ke du malsamuloj kiel ĉi tiuj eĉ interparolis, kaj eĉ pli strange, ke ili ekamis. Sed tio okazis. Paĉjo vojaĝis al Jleyerán tuj postkiam ektumultis la havenlaboristoj. Kiam ekbrulis la kvartalo Bizif Flolas, Panjo kun kelkaj aliaj elkuris laŭ la Strato de Fideco (tiam nomata Fiedasüt), strato plena je homoj konfuzataj kaj frenezigataj. En sia senatenta mishasto ŝi koliziis plenbruste kun Paĉjo, falis ĉe liaj piedoj, kaj ekploregis nekompreneble.

La fino de la Unua Respubliko kaŭzis ankaŭ la finon de la familio de mia patrino. La plimulto pereis ĉe la brulo de Bizif Flolas. Sed por mia patro tiu epoko estis la aŭroro de nova epoko. La diktatoron Jleyer kaj ĉion lian detruontis la fajro kaj sangofluo de la revolucio, kaj fondiĝontis la Dua Respubliko. En ĉio ĉi partoprenis mia patro, ĝoja pro la triumfo de la revolucio, kaj plena je malamego kontraŭ ĉio antaŭa. Fideluloj de Jleyer aŭ mortis aŭ ŝanĝis partion aŭ retiriĝis; diverspretekste ili ne kontraŭstaris. La Volapükon oni abolicis, kaj oficialiĝis Esperanto, lingvo jam parolata en la kamparo ĉirkaŭ la ĉefurbo. La ĉefurbon Jleyerán mem oni renomis Espero.

Mia propro vivo proksimume samtempas kun tiu de la Dua Respubliko. Mi travivis la danĝeran disiĝemon de la unuaj registaroj, kaj la du invadojn, kaj la oftajn malsukcesojn de rikoltoj. Por mi la institucioj de la Dua Respubliko ankaŭ estas tute naturaj: la Dua Asembleo, la multaj senkatenaj presejoj, la pasportoj sen limoj, kaj similaj. Sed la estonteco estas malcerta.

La Respublikoj (daŭrigo)

Hieraŭ en la urbocentro ektumultis bando da junuloj, pli severe ol iam antaŭe je mia sperto. Malgraŭ policaj penoj, la grupo pligrandiĝis de horo al horo ĝis kiam, ĉi-matene, la tuta urbo verŝajne ribeladas. La celo de la ribelado ne estas tre klara. Verŝajne ĉies celoj malsamas. Komence la ribelanoj postulis stipendiojn por la studentoj kaj pli grandan salajron por la stratlaboristoj. Pasintan vesperon ili postulis ankaŭ pli bonajn medicinajn servojn. Noktomeze militon kontraŭ imperiismaj nacioj. Hodiaŭ matene finon de la uzado de Esperanto kiel nacia lingvo kaj malfondon de la Respubliko mem, pro la "reakcieco" de ambaŭ.

"La Dua Respubliko estas bankrota, reakcia," min diris la filo antaŭ kelkaj minutoj, "and it must be destroyed; the future belongs to the Revolution!"

*

-

*

N.d.l.R.: Unuope ricevitajn librojn ni mencias. Duope ricevitajn ni recenzas. Kvinope ricevitajn ni laŭdas kaj donacas al amikoj. Dekope ricevitajn ni laŭdegas kaj vendas. --karl pov

6 - 11 - 57 - ? - 57 - 11 - 6

Ĉu ĉimpanzoj estas homoj?

--Daniel Mason

Multfoje sciencistoj nomis la homon la sola besto kiu faras kaj uzas ilojn.* Sed nun ĉi tiu difino ne sufiĉas. En la nova libro In the Shadow of Man (En la Ombro de l' Homo) Jane Van Lawick Goodall montras ke almenaŭ unu alia besto tre ofte uzas kaj eĉ faras ilojn. Tiu besto estas la ĉimpanzo. Dum pli ol jardeko s-ino Goodall studis la sovaĝajn ĉimpanzojn en Afriko. Multaj sciencistoj nun kredas ke la ĉimpanzo estas la plej proksima vivanta najbaro al la homo laŭ evoluo. Do, al la sciencistoj la ĉimpanzo estas tre interesa kaj tre grava besto.

Unu ekzemplo de ĉimpanza ilouzado estas la kaptado de termitoj per branĉetoj aŭ longaj herberoj. Unue, la ĉimpanzo elektas rektan branĉeton kaj fortiras la foliojn de tio. Tiel la ĉimpanzo faras ilon. Ofte la ĉimpanzo preparas kelkajn branĉetojn samtempe--tempoŝparo, ĉu ne? Due, la hirta ilouzanto portas siajn ilojn al proksima termito-monteto. Tie nia evolunajbaro enpuŝas branĉeton kaj post momento zorge eltiras ĝin. Sur la branĉeto estas multaj insektoj, kiujn la ĉimpanzo avide manĝas.

Alia ekzemplo de ilouzado estas la uzo de ŝtonoj kiel ĵetaĵoj. La unuan fojon kiam s-ro Van Lawick vizitis la ĝangalan kampejon de sia estonta edzino, unu ĉimpanzo ĵetis ŝtonon al li. Kelkfoje ges-roj Van Lawick vidis ĉimpanzojn kiuj uzas branĉon por levi aŭ renversi ŝtonojn aŭ malfermi insektajn nestojn dum serĉado por insektoj. Ankaŭ ĉimpanzoj uzas branĉojn kiel bastonojn, herberojn kiel dentopikilojn kaj foliojn kiel bandaĝojn, buŝtukojn, "necesejajn paperojn" kaj aliajn viŝilojn.

Post la eltrovoj de ges-roj Van Lawick, la sciencistoj, kompreneble, devas elekti alian difinon de "homo" aŭ nomi ĉimpanzojn homoj.

*Rimarku: Kelkaj bestoj uzas ilojn sed ne faras ilin. La marlutro de la nordokcidenta marbordo de Nordameriko, ekzemple, uzas ŝtonojn por rompi konkojn de manĝeblaj estaĵoj.

Respondo al Tiĉjo (vd. JEN-Bulteno, n-ro 1, 1972)

Estimata s-ro Fallis:

Mi legis vian belan artikolon pri via kara urbestro Jorti, kaj mi volas respondi.

Ĉar vi loĝas en Kalifornio, kun ties dudek milionoj da benzinejoj, tri miliardoj da hipioj, kvincent duilionoj da mejloj da ekspresoseoj, kaj unu kvadratmejllo da pura aero, eble vi havas kelkajn misideojn pri Novhampŝiro.

Mi fieras esti novhampŝirano, do mi doloriĝis legi pri niaj "kvardek tri" enloĝantoj. Ho ve! Mi kredas, ke tiel atenta verkisto kiel vi, sinjoro, unue zorgus eltrovi la ĝustajn faktojn pri sia temo antaŭ ol li ekmalfermus la buŝon. Verŝajne la libro, laŭ kiu nia ŝtato havas tian enloĝantaron, estis iomete malnova. Laŭ la popolnombrado de 1960, ni tiam havis ja kvardek tri enloĝantojn; sed pro grava naskiĝeksplodo kaj enfluo da maseĉusecanoj volantaj fuĝi for de Bostono, nun troviĝas entute kvindek unu enloĝantoj ĉi tie.

Eble vi ankoraŭ ridos pri tiu malgranda nombro, sed restas almenaŭ unu konsolo: kvankam estas nur unu sola esperantisto (mi) en la ŝtato, la proporcio de esperantistoj estas preskaŭ 2%! Ĉu alia ŝtato usona pretendas tion?

--Kevin Carmody, Hanover, NH

ELNA-Bulteno
731 Birmingham Road
Burbank, CA 91504
Usono / U. S. A.

BULK RATE U.S. POSTAGE PAID GLENDALE, CALIF. PERMIT #575
--

El